

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

(Periodo de 1930 - 1961)

La jaro 1930 estis malfacila jaro por Belga Ligo Esperantista pro interna konflikto kaj skismo. Post la 18a nacia kongreso okazinta en Gento en 1929 (18-20 majo) kelkaj flandremaj esperantistoj, malkontentaj pro la fakto ke la Genta urbestro akceptis la kongreson franclingve, starigis flandreman Esperanto-movadon. La krizo pruviĝis tamen poste multe malpli grava ol ĝi aspektis en 1930 kaj en la ĝenerala kunveno de la 24a de majo 1931 la ĝenerala sekretario povis raporti ke "la rilatoj inter la (25) grupoj kaj la ligestro estas plej agrablaj kaj afablaj".

La ligo prezidanto, Frans Schoofs, ludis gravan rolon en konekto kun la reorganizo de la internacia Esperanto-movado en 1932/1933, kiu, post nuligo en 1932 de la "Interkonsento de Helsinki", rezultigis fine en 1933 la "Planon de Genevo" kaj la "Interkonsenton de Kolonjo", laŭ kiuj Universala Esperanto-Asocio estiĝis la centra kaj direktanta organismo de la internacia Esperanto-movado kaj Belga Ligo Esperantista estiĝis la sola reprezentanto de la tuta movado en Belgio. Laŭ la nova aranĝo BLE rajtis havi unu komitatano de UEA kaj en sia kunveno de la 17a de decembro 1933 la Komitato de la ligo konfirmis la mandatojn de H. Petiau, komitatano, kaj de F. Schoofs, ĉefdelegito. Post la morto de F. Schoofs (12 marto 1934) speciala estrara kunsido elektis la vicprezidanton L. Cogen kiel provizoran prezidanton kaj M. Jaumotte kiel direktoron de Belga Esperantista (ekde la numero de majo 1934) kaj M. De Ketelaere kiel ĉefdelegiton kun H. Boffejon kiel anstataŭanto. La ĝenerala kunsido de la 21a de oktobro 1934 elektis novan estraron kaj decidis la dividon de la estrada laboro jene: prez.: P. Kempeneers (ĝenerala gvidado kaj eksteraj aferoj); vicprez.: L. Cogen (instruaj aferoj) kaj F-ino Yv. Thooris (propagando); ĝenerala sekr.: H. Petiau; kasisto: M. Jaumotte (financoj, gazeto, gazetara servo). M. Jaumotte estis elektata kiel konstanta komitatano anstataŭ F. Schoofs kaj M. De Ketelaere estis elektata kiel ĉefdelegito.

En la sama jaro mortis ankaŭ la prezidanto pro honoro A.J. Witteryck.

Priparoloj iniciatitaj de S-ro Wadham, ĉefdelegito de UEA en Londono, celantaj ian interkonsenton inter Belga Ligo Esperantista kaj Flandra Ligo Esperantista, restis senrezultaj.

En 1935 la Ligo akiris la oficialan titolon "Reĝa Societo" kaj de tiam nomiĝis "Reĝa Belga Ligo Esperantista" kaj en la sama jaro ĝi atingis la sufiĉe gravan rezulton, ke la Universala Ekspozicio de Bruselo uzis nian lingvon por sia eksterlanda propagando.

En 1936 Reĝa Belga Ligo Esperantista estiĝis laŭleĝa "societo sen profita celo".

Pro la transloĝigo de UEA de Genevo al Londono (1936) la internacia organizaĵo travivis krizon. Kelkaj svisaj membroj kontraŭstaris la transloĝigon kaj akiris tribunalan juĝon ke UEA devas resti en ~~Genevo~~ Svislando. Kiel la granda plimulto de la landaj asocioj ankaŭ Reĝa Belga Ligo Esperantista eksciĝis el ĝi kaj aliĝis al la nova "Internacia Esperanto-Ligo" en Londono, kiu plue aktivis sammaniere kiel ĝi faris antaŭe sub la nomo Universala Esperanto-Asocio. Same kiel antaŭ la ŝanĝoj en la internacia organizaĵo, BLE restis la sola reprezentanto de la tuta movado en Belgio.

Ĉe la komenciĝo de la dua mondmilito la komitato de la Ligo konsistis al 15 administrantoj: A. Faes, M. Jaumotte, A. Wauters (Antverpeno); F-ino Yv. Thooris, Ch. Poupeye, Ch. Decoster (Bruĝo); P. Kempeneers, F-ino A. Jennen (Bruselo); Cl. Vandavelde (Gento); L. Cogen kaj Caffonnette (malgrandaj grupoj kaj izoluloj); A. Tassin, J. Robert, G. Van den Bossche

(kooptaj administrantoj) kaj 3 komisaroj: M. Roost, F. Mathieux kaj J. Alofs. La estraro estas jene kunmetita: prez.: P. Kempeneers; vicprez.: F-ino Yv. Thooris kaj M. Jaumotte; sekretario: Ch. Poupeye; kas.: A. Tassin; emerita vicprezidanto L. Cogen kaj emerita administrantino S-ino Elworthy-Posenaer.

Dum la milito la aktivado de la Ligo estis preskaŭ tute haltigita, sed post la fino de la milito la restantaj gvidantoj rapide reeklaboris. Jam la 25an de novembro 1945 okazis kunveno de la Administrantaro, kiun ĉeestis P. Kempeneers, prez.; M. Jaumotte, vicprez.; A. Tassin, kasisto; Ch. Poupeye, sekr. kaj F-ino A. Jennen, administrantino. Senkulpiĝis S-ino Elworthy-Posenaer, F-ino Yv. Thooris, Ch. Decoster, Aug. Faes kaj Cl. Vandavelde, geadministrantoj. El la raportoj evidentigis ke la financa situacio de la Ligo estas bona, sed ke la grupoj ankoraŭ baraktas. Nur la Brusela Grupo kunvenas kaj enskribigis 58 membrojn. Antaŭ tiu malfacila situacio la kunveno decidis tuj fari la necesajn paŝojn por revigligi la movadon en Belgio kaj faris i.a. la sekvantajn decidojn: Ĝi fiksas la kotizojn, plilongigis la mandatojn de la administrantoj, komisaroj kaj estraranoj ĝis la ĝenerala kunsido de la Ligo okazonta la 7an de aprilo 1946, decidis ke Belga Esperantisto reaperu ĉirkaŭ la 25a de decembro 1945, komisiis al M. Jaumotte kaj G. Van den Bossche la prizorgon de la gazetara servo kaj komisiis al la Brusela Grupo organizi la 30an nacian kongreson je la 9a de junio 1946, se eble en kunlaboro kun Intergrupa Komitato Esperantista de Bruselo, tiamaniere ke ĉiuj esperantistoj povu partopreni en ĝi. Koncerne tion M. Jaumotte devis interrilati kun S-ro Van Gindertaelen, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista.

La sama kunsido ankaŭ decidis ke ne-membroj de RBLE povas esti akceptataj kiel Delegitoj de ~~NEA~~ IEL nur en lokoj kie ne jam estas delegito kaj kie ne loĝas membro de RBLE kiu konvenas por tiu posteno.

La decidoj de ĉiu kunsido estis certe kuraĝaj. Kelkaj estis ja tro kuraĝaj kaj ne estas mirige ke ili ne povis esti plenumataj. Krom unu numero je la 25a de decembro 1945 Belga Esperantisto reaperis nur en januaro 1949 kaj en tiu jaro eliris nur 6 numeroj kun 54 paĝoj. Intertempe ĝin anstataŭis "Bulteno de Reĝa Belga Ligo Esperantista" de kiu aperis en 1946 du 8-paĝaj numeroj (okt. kaj dec.), en 1947 kvin numeroj kun 52 paĝoj kaj en 1948 du numeroj kun 16 paĝoj (feb. kaj marto). Kaj ankaŭ la nacia kongreso antaŭvidita por la 9a de junio 1946 ne povis okazi.

La ĝenerala kunsido de la 7a de aprilo 1946 elektis, pro la postmilitaj malfacilaĵoj sur la bazo de la grupaj membronombroj de 1939, administrantaron konsistantan el: F-ino A. Jennen, S-ino J. Plyson, S-roj Boving, Ch. Decoster, De Mayer, A. Faes, M. Jaumotte, P. Kempeneers, Ch. Poupeye, A. Tassin, G. Van den Bossche, Cl. Vandavelde, A. Wauters kaj la honoraj administrantinoj S-ino M. Elworthy-Posenaer kaj F-ino Yv. Thooris, kiu tamen rezignis. Kiel komisaroj estis elektataj: J. Alofs, Everaerts kaj F. Mathieux. La administrantara kunsido de la sama dato elektis la estraron jene: prez. P. Kempeneers, vicprez. F-ino A. Jennen kaj M. Jaumotte, ĝen. sekr. Cl. Vandavelde, kas. A. Tassin, sekr. Ch. Poupeye.

La grupoj nur malfacile kaj malrapide venkis la pro- kaj postmilitajn malfacilaĵojn kaj en la "Bulteno de Reĝa Belga Ligo Esperantista" de okt. 1946 aperis raportoj nur pri vegeta vivo de la grupoj de Bruĝo, Bruselo, Gento kaj Antverpeno kaj de novaj grupoj en Namur kaj Nivelles. En la sama jaro ili sukcesis tamen kolekti pli ol 5000 subskribojn al la peticio al UN pri internacia lingvo kaj la Antverpena grupo "La Verda Stelo" povis preni sur sin la organizon de la 3la nacia Kongreso, kiu sukcese okazis je pentekosto 1947.

La jaron 1947 oni povus nomi jaro de unueco. Sur la internacia tereno post pli ol 20 jaroj fine solviĝis la organiza demando per la reunuiĝo de

IEL kaj UEA kaj ankaŭ en nia lando montriĝis la unuaj signoj de naskiĝanta interproksimiĝo inter RBLE kaj FLE, kiu baldaŭ konkretiĝis per la starigo de "Centra Komitato de la Esperanto-Organizaĵoj en Belgujo" (22 jun 1948).

En 1953 okazis en Antverpeno la unua Beneluksa Kongreso komune organizita de RBLE, FLE kaj la Nederlanda Asocio L.E.E.N. kaj la sukceso de tiu kongreso instigis la tri ligojn daŭrigi sian kunlaboron, el kio rezultis tuta serio da pliaj komunaj Beneluksaj Kongresoj de 1954 ĝis 1963 kaj la komuna redaktado de la revuoj kune kun la Svisa Esperanto Societo.

Aliflanke la estraroj de RBLE kaj de FLE starigis je la 14a de nov.1953 interligan komitaton sub la nomo "Belga Centra Komitato Esperantista" kun estraro konsistanta el: prez. P. Kempeneers (RBLE), vicprez. G. Debrouwere (FLE) kaj M. Jaumotte (RBLE), sekr. Gr. Maertens (FLE) kaj H. Sielens (RBLE), komuna administranto de la revuoj: D-ro T. Van Gindertaelen (FLE).

Tiu Komitato tuj efike ekfunkciis preparante la eldonon de komuna gazeto kun, laŭbezono 2 aŭ 3 ~~paĝoj~~ apartaj paĝoj por la ligaj sciigoj, ~~lauxorgan~~ kaj la organizon de la Beneluksa Kongreso de 1954 en Lieĝo kaj de Antaŭkongreso en Antverpeno okaze de la 39a Universala Kongreso de 1954 en Haarlem. Krome ĝi petis la Centran Oficejon de UEA, nome de ambaŭ Ligoj, forigi el la nova eldono de la Jarlibro la distingajn literojn (B) kaj (F) por la delegitoj en kelkaj lokoj de la lando.

Fine la kunlaboro inter la du Ligoj okaze de la 45a UK (Bruselo 30 jul - 6 aŭg 1960) kondukis al la reunuiĝo de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Flandra Ligo Esperantista en la nova komuna "Belga Esperanto-Federacio". Per la starigo de Belga Esperanto-Federacio, je la 7a de oktobro 1961, feliĉe refariĝis, post 32 jaroj, la unueco de la Esperanto-movado en Belgio.

Reĝa Belga Ligo Esperantista, kiu brile festis sian Oran Jubileon la 12an-13an de februaro 1955, libervole mortis en 1961 por renaskiĝi en la promesplena unueca Belga Esperanto-Federacio.

Ni ne povas preterlasi sekvigii ĉi tie la Honoran Kolonon de la sindonemaj esperantistoj kiuj gvidis ĝin dum ĝia 56-jara fruktodona ekzistado:

Prezidantoj:

S-ro Komandanto Charles Lemaire 30.7.05/20.9.08
S-ro Amatus Van der Biest 25.10.08/8.10.11
S-ro A.J. Witteryck 8.10.11/6.6.27 (x)
S-ro Frans Schoofs 6.6.27/12.3.34 (x)
S-ro Paul Kempeneers 21.10.34/16.1.54
S-ro Maurice Jaumotte 16.1.54/7.10.61

Visprezidantoj:

S-ro Amatus Van der Biest 31.12.06/25.10.08
S-ro Lucien Blanjean 30.12.06/20.9.08
S-ro A.J. Witteryck 25.10.08/8.10.11
S-ro Abato Richardson 25.10.08/20.8.13
S-ro L. Delvaux 8.10.11/ĝis la milito 1914
S-ro Léon Cogen 1920/21,25.4.37
S-ro Paul Kempeneers 6.6.27/21.10.34
F-ino Yvonne Thooris 1935/7.4.46
S-ro Maurice Jaumotte 25.4.37/16.1.54
F-ino Antoinette Jennen 7.4.46/22.11.48
S-ro André Tassin 24.4.49/1.9.51
S-ro Joseph Soyeur 16.1.54/16.12.59
S-ino Julia Plyson 30.4.55/7.10.61
S-ro Henri Sielens 13.2.60/7.10.61
S-ro Pol Denoël 13.2.60/7.10.61

Generalaj Sekretarioj:

S-ro Maurice Seynave 20.7.05/30.12.06
S-ro Jos. ~~Jamin~~ Jamin 30.12.06/20.9.08
S-ro Léon Champy 25.10.08/16.8.13
S-ro Henri Pétiau 17.8.13/27.4.36
S-ro Maurice Jaumotte 31.5.36/15.5.37
S-ro Charles Poupeye 25.4.37/7.4.46
S-ro Clotaire Vandeveld 7.4.46/1.12.51
S-ro Henri Sielens 8.3.52/13.2.60
S-ro Luc De Marré 13.2.60/7.10.61

Estis elektataj por kelka tempo "sekretarioj": S-ro Dechesne kaj Swinne, en 1937; Verdier, en 1949 kaj Soyeur, en 1952

KASISTOJ:

S-fo J. Coox 30.12.06/18.10.08
S-ro Oscar Van Schoor 25.10.08/27.11.10
S-ro L. Delvaux 27.11.10/8.10.11
S-ro Fernand Mathieux 8.10.11/28.4.29
S-ro Maurice Jaumotte 28.4.29/25.4.37
S-ro André Tassin 25.4.37/27.4.49
S-ino Julia Plyson 24.4.49/16.1.54
S-ro Henri Sielens 16.1.54/30.4.55
S-ro Joseph Soyeur 30.4.55/16.12.59
F-ino Rosetta Huysmans (poste S-ino N. Van Herck-Huysmans) 13.2.60/7.10.61

Diplomitaj Profesoroj:

101 kandidatoj akiris la diplomon pri profesora kapableco:

Antverpeno:	38
Gento:	37
Bruselo:	15
Bruĝo	4
Lokoj diversaj:	6
Eksterlando:	1
	<hr/>
	101
Plus	<hr/>
	9 diplomoj "pro Honoro"
Entute	110 diplomitoj.

El tiuj 110 diplomitoj, estas nun ankoraŭ vivantaj kaj membroj de Belga Esperanto-Federacio:

1908: S-ino Félicie Staes-Vandevoorde, Bruselo (?)
1909: S-ro Jan Jacobs, Antverpeno (?)
1910: F-ino Yvonne Theoris, Bruĝo
S-ro Fernand Mathieux, Bruselo (?)
1912: F-ino Juliette Nachtergaele, Gento (?)
~~1920: S-ro Clotaire Vandeveld, Gento (?)~~
1922: F-ino Simone Obozinski, Bruselo (?)
1928: S-ro Paul Kempeneers, Bruselo
1935: S-ro Hector Boffejon, Antverpeno
S-ro Henri Sielens, Antverpeno
Jules Alofs, Bruselo (?)

La 9 diplomitoj "Pro Honoro" estis:

2.2.09: S-ro Frans Swagers, Antverpeno
S-ro Ad. Finet, Antverpeno

- 27.2.10: S-ro J. Parotte, Verviers
D-ro Willem Van der Biest, Antverpeno
- 26.5.12: Abato A. Richardson, Bruselo
S-ro L. Delvaux, Charleroi
S-ro F. Wagner, Charleroi
S-ro Oscar Van Schoor, Antverpeno
S-ro Frans Schoofs, Antverpeno

Ciuj 9 diplomitoj "Pro Honoro" estas mortintaj.

N.B. La statistiko pri la diplomitaj profesoroj ne estas kompleta. Ĝi aperis tia en Belga Esperantisto de marto 1955 kaj poste mi trovis neniajn menciojn tiurilataj. Mi rimarkigas ke la sola dokumentaro en mia posedo estas Belga Esperantisto.

H. Boffejon
5.12.1970

/tuj

Belga Esperantisto: Organo de Belga Ligo Esperantista (poste Reĝa Belga Ligo Esperantista), fondita en 1908. Redaktis: L. Champy, Van Laere, Van der Biest-Andelhof, Oscar Van Schoor, Frans Schoofs (1a eld. de Enciklopedio de Espéranto). Post la morto de Frans Schoofs (12 marto 1934), ekde la numero de majo 1934 ĝis la fino de 1961 ĝin redaktis M. Jaumotte. Pro la dua mondmilito la eldonado estis interrompita post la numero de jan/feb/marto 1940. Provo reeldoni ĝin post la fino de la milito malsukcesis (aperis nur unu numero, dec 1945) kaj nur en januaro 1949 ĝi povis regule reaperi. Dum 1946/1948 ĝin anstataŭis "Bulteno de Reĝa Belga Ligo Esperantista", kiun redaktis Cl. Vandeveld. Fine de 1961, pro la reunuiĝo de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Flandra Ligo Esperantista, ĝi ĉesis aperi kaj estis anstataŭata per "Sonorilo", la organo de la nova komuna "Belga Esperanto-Federacio". "Sonorilo'n" redaktis M. Jaumotte, F. Roose kaj Gr. Martens.

(12 mart 1934)

Belga Esperanto-Instituto: Koopera societo fondita en Antverpeno la unuan de marto 1926 por la eldonado, presado kaj vendado de esperantaĵoj. Krom multaj gramatikoj, lernolibroj kaj propagandiloj ĝi eldonis la jenajn verkojn: ~~Antologio~~ Belga Antologio (flandra kaj franclingva partoj), Rimvortaro de M. Jaumotte, nederlandlingva kaj franclingva eldonoj de "Fundamento de Esperanto", de "Esence kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia" de Unuel (D-ro L.L. Zamenhof) kaj de "Initiation à l'Espéranto" - "Inleidng tot Esperanto" (Enkonduko al Esperanto) de Rollet de l'Isle. La unua administrantaro konsistis el s-roj Fr. Schoofs, M. Jaumotte, Edg. De Coster, M. De Ketelaere, G. Vermandere, Oscar Van Schoor. Komisaroj estis s-roj Ch. Van der Veken, L. De Hondt, H. Vermuyten kaj f-inoj De Buyser kaj J. Morrens. Post la morto de Fr. Schoofs, kiu estis la animo de BEI, s-roj H. Boffejon, L. De Hondt kaj Ch. Van der Veken estis elektataj kiel administrantoj kaj H. Boffejon direktis la Instituton ĝis 1937. Sub lia impulso la Instituto instaliĝis en butikoj kun du grandaj ĉestrataj vitrinoj en trafikplena strato ne malproksima de la urbocentro, kie ĝi restis ĝis 1947. Tiam la butikoj devis esti fermataj pro la militaj kaj postmilitaj cirkonstancoj kaj BEI estis transloĝigata en la loĝejon de G. Van den Bossche ĝis ties ekŝigo pro malsano en 1960, kiam transprenis ĝian gvidadon f-ino Elsa Van der Weken. En 1962, pro la reunuiĝo de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Flandra Ligo Esperantista, ĝi kunfandiĝis kun Flandra Esperanto-Instituto en la nova komuna "Eldonejo-Librejo Sonorilo", kiun gvidas s-ro R. Iserentant en Bruĝo.

/sola

UEA en Belgujo: Laŭ la regularoj de UEA (poste IEL) Reĝa Belga Ligo Esperantista sola reprezentis tiujn organizaĵojn en Belgujo. En sia administrantara kunsido de la 25a de novembro 1945 RBLE decidis ke ankaŭ ne-membroj de la Ligo povas esti akceptataj kiel deleditoj de IEL (poste UEA) nur en lokoj kie ne jam estas delegito kaj kie ne loĝas membro de RBLE kiu konvenas por tiu posteno. Kaj en la Jarlibro 1947 de la reunuiĝinta UEA aperas por la unua fojo delegitoj de Flandra Ligo Esperantista kaj en la Jarlibro de 1948 ambaŭ ligoj, RBLE kaj FLE, estas menciitaj kiel landaj asocioj aliĝintaj al UEA. La 14an de nov 1953 RBLE kaj FLE starigis interligan komitaton sub la nomo "Belga Centra Komitato Esperantista" kiu, nome de ambaŭ ligoj, petis UEA forigi el la nova eldono de la jarlibro la distingajn literojn (B) kaj (F). Tio okazis tamen nur en la Jarlibro de 1962 en kiu ankaŭ estas menciita kiel aliĝinta landa asocio en Belgujo "Belga Esperanto-Federacio" en kiu RBLE kaj FLE estis reunuiĝintaj ekde la 7a de okt 1961. Ĉefdelegitoj estis: F. Schoofs (ĝis lia morto 12 marto 1934), M. De Ketelaere (1934-1936), G. Van den Bossche (1940-1950), Fr. Schellekens (1963-1970). Dum la jaroj 1937-1939 ne estis ĉefdelegito kaj G. Van den Bossche funkciis kiel peranto de IEL. Same dum la jaroj 1951-1962 ne estis ĉefdelegitoj kaj ambaŭ ligoj (RBLE kaj FLE) funkciis kiel perantoj (RBLE: ~~de~~ 1951-1955 rekte, 1956-1959 pere de J. Soyeur, 1960-1962 pere de f-ino R. Huysmans, poste s-ino

R. Van Herck-Huysmans; FLE: 1951-1962 pere de Fr. Couwenbergh).

Kongresoj: Depost 1930 Belga Ligo Esperantista (poste Reĝa Belga Ligo Esperantista") organizis la jenajn kongresojn:

1930, 7-10 jun en Lieĝo dum la Universala Ekspozicio, kun tutsomera Esperanto-fako, la 19a landa kongreso;

1931, 23-26 maj en Nieuwpoort, la 20a landa kongreso;

1932, 14-16 maj en Antverpeno, la 21a landa k.;

1933, 3-5 jun en Bruselo, la 22 a landa k.;

1935, 8-10 jun en Bruĝo, la 24a landa k.;

1936, 30 maj-1 jun en La Louvière, la 25a landa k.;

1937, 15-17 maj en Antverpeno, la 26a landa k.;

1938, ~~27-29 maj~~ 4-6 jun en Charleroi, la 27a landa k.;

1939, 27-29 maj en Loveno, la 28a landa k.;

1947, 25-27 maj en Antverpeno, la 31a landa k.;

1948, 15-17 maj en Charleroi, la 32a landa k.;

1949, 4-6 jun en Bruĝo, la 33a landa k.;

1950, 27-29 maj en Spa, la 34a landa k.;

1951, 12-14 maj en Bruselo, la 35a landa k.;

1952, 31 maj-2 jun en Bruĝo, la 36a landa k.;

Post 1952, dank'al la disvolviganta spirito de unueco inter RBLE kaj FLE, okazis serio da Beneluksaj Kongresoj komune organizitaj de RBLE, FLE kaj la Nederlanda Asocio L.E.E.N.:

1953, 23-25 maj en Antverpeno, la 1a Beneluksa Kongreso (37a landa k.);

1954, 5-7 jun en Lieĝo, la 2a B.K. (38a landa k.);

1956, 19-21 maj en Gento, la 4a B.K. (40a landa k.);

1961, 20-22 maj en Namur, la 7a B.K. (43a landa k.).

La postaj landaj kaj Beneluksaj kongresoj estis jam organizataj de Belga Esperanto-Federacio (en kiu RBLE kaj FLE estis reunuigintaj) kaj L.E.E.N.

La 23a, 29a kaj 30a landaj kongresoj (resp. 1934 Spa, 1940 Bruselo kaj 1946 Bruselo) ne povis okazi, la unua pro la morto de Fr. Schoofs (12 marto 1934) kaj la du aliaj pro la dua mondmilito. Ankaŭ en 1958 kaj 1960 ne okazis landaj kongresoj en Belgujo pro la Universala Ekspozicio de 1958 kaj la 45a Universala Kongreso de Esperanto 1960, kiuj ambaŭ okazis en Bruselo.

La 3a, 5a kaj 6a Beneluksaj kongresoj (resp. 39a, 41a kaj 42a landaj k.) okazis en Nederlando (Utrecht, Eindhoven kaj Haarlem).

1960, 30 jul - 6 aŭg okazis la 45a Universala Kongreso en Bruselo.

Ĉiuj landaj kongresoj ĝuis la oficialan apogon de la lokaj aŭtoritatoj kaj la 45a UK staris sub la alta protekto de la Belga reĝo.

Prezidis la landajn kongresojn: Fr. Schoofs (ĝis lia morto 12 marto 1934), P. Kempeneers (1935 ĝis 1939 kaj 1947 ĝis inkl. 1952). La unuan Beneluksan Kongreson (1953) prezidis D-ro Th. Van Gindertaelen, la postajn BK kune prezidis la prezidantoj de la 3 organizantaj ligoj: M. Jaumotte (RBLE), G. Debrouwere (FLE) kaj H.J. Blokker, F. Weecke kaj Kervers (L.E.E.N.).

Fondaĵo Antoinette Jennen: Fraŭlino Antoinette Jennen, emerita lerneĝestrino en Bruselo, vicprezidantino de Reĝa Belga Ligo Esperantista de la 7a de aprilo 1946 ĝis ŝia morto je la 22a de novembro 1948, postlasis heredajon al RBLE per kiu estis starigata la "Fondaĵo Antoinette Jennen". Celo de la fondaĵo estis: ĉiujare doni premion al la Grupo de RBLE plej meritplena laŭ membrovarbado. Por la unuaj du jaroj tamen la Juĝa Komisiono decidis aljuĝi la premion al s-ino M. Elworthy-Posenaer (1950) pro ŝia pionira aktivado kaj al Bruĝa Grupo Esperantista (1951) pro ĝia Ora Jubileo 1952. La postaj jarojn la premion gajnis la grupoj de Bruselo (1952), Verviers (1953 kaj 1954), La Verda Stelo, Antverpeno (1955), Bruĝo (1956), Charleroi (1957), Lieĝo (1958 kaj 1959), ? (1960), ? (1961).